



La Karavelo

internacia kultura magazino en esperanto

ekvelante el Brazilo

Ĉefartikolo

Ĉu esperanto havas
ajnan utilon?

Kovrila foto (JJS):
*Enloĝanto de
Lago Paranoao en Braziljo*



La Geedzeco
(Erasmus - fino)
trad. Gerrit Berveling

Mesaĝo de Pesoo
(la libro)
João José Santos

Ostap Bender
fascina romanheroo
Luiza Carol

Lago Paranoao
Braziljo
João José Santos

Kapoejraj kantoj
Tone

Brazilaj indiĝenaj
rakontoj
Roberto Ribeiro

En la 27a L.K.

1 **Kovrilo**

2 **Enhavtabelo**

2 **Kolofono**

3 **LK-Katalogo**

4 **Ĉu esperanto havas
5 ajnan utilon?**

6 **La geedzeco**
10



João José Santos



Erasmus el Roterdamo
trad. Gerrit Berveling

11 **Lago Paranoao -
Braziljo**



João José Santos

12 **Eldoniĝas la traduko**
13 **de Mesaço**
de Fernando Pessoa



João José Santos

14 **Ostap Bender –**
17 **fascina romanheroo**



Luiza Carol

18 **Kapoejraj kantoj**
19



Tone

20 **Brazilaj indiĝenaj**
23 **rakontoj**




Roberto Ribeiro

24 **Dolça rizo**



João José Santos



lakaravelo@gmail.com
www.lakaravelo.net

Adreso

QSC 18, Lote 27, Kit 01
Taguatinga Sul - DF
CEP 72016-180 - Brasil

Noto

Preferinde kontaktu La Karavelon
nur per retmesaĝoj.
Uzu la fizikan adreson nur por
sendo de varoj.

ISSN (papera) 1647-6980
ISSN (DVD) 1647-6999
ISSN (reta) 1647-3353

Leĝa Depono en
"Biblioteca Nacional de Portugal"
301472/09

Reta versio

Senpaga por perkomputila legado.

Papera versio - por 1 revuo

10 € (eŭroj) + sendokostoj, aŭ
25 R\$ (realoj) + sendokostoj
Ne eblas ĝin aboni. Mendu ĉe LK-
revendejo. Vidu paĝon 3.

Tradukoj, republikigoj, citaĵoj

Petu skriban permeson al la LK-
direktisto.

Stabo de La Karavelo

Cindy McKee (US)
Gerrit Berveling (NL)
João José Santos (PT)
Luiza Carol
Paulo Sergio Viana (BR)
Roberto Ribeiro (BR)
Roger Gotardi (BR)
Valentin Melnikov (RU)

- verkas aŭ tradukas
 - revizias aŭ iel kunlaboras

Fondis, direktas, redaktas, kompostas

João José Santos (Portugaliao)

libera softvaro

© João José M. Q. dos Santos

www.lakaravelo.net
aŭ: **www.lakaravelo.co.cc**

www.linguainternacional.co.cc
Informo por portugallingvanoj.





verko	aŭtoro	lingvo	eŭroj	realoj
Magazino La Karavelo 24 p., A4, luksa papero, tutkolora. En ĝi kunlaboras kelkaj el la plej prestiĝaj esperanto-verkistoj. Ĉiu ekzemplero	Kunlaboras fakaj verkistoj kaj tradukistoj el multaj landoj. Konsultu la kolofonon de la lasta numero de La Karavelo.	esperanto	10,00	25,00
Esperanto em 30 horas Lernolibro de esperanto por portugallingvaj e-komencantoj. 25 lecionoj, Vortareto Esperanto-Portugala, Vortareto Portugala-Esperanto, Gramatika Gvidilo, Aneksoj. 300 p., blankenigra.	João José Santos (elĉerpita - aperos nova eldono)	portugala esperanto	25,00	65,00
O esperanto é fixe! Lernolibro de esperanto por portugallingvaj e-komencantoj. Por junuloj, 48 p., kolora.	João José Santos	portugala esperanto	12,00	30,00
Rakontoj por ĉiuj aĝoj Libro kun 26 rakontoj en facila esperanto. 146 p.	Luiza Carol	esperanto	16,00	35,00
Liberaj tempoj Novelo pri unu tago en la vivo de manlaboristo. 124 p.	Eduardo Novembro	esperanto	16,00	35,00
La ĝenerala asembleo Komeditragedio pri du malsamaj konceptoj pri esperanto-asocio. 48 p.	João José Santos	esperanto	12,00	30,00
Aŭtodafeo Honora Mencio - Belartaj Konkursoj - UEA 2011				
Komeditragedio pri diktatorecaj teniĝoj. 40 p.	João José Santos	esperanto	12,00	30,00
Identeco kaj ĉeesto de Kamilo Kastelo Branko en "El la lando de la lumo" Spiritisma eseo. 160 p.	João José Santos	esperanta portugala (dulingva)	16,00	35,00



Kiel aĉeti?

1. La Karavelo nur esceptokaze vendas siajn varojn rekte al la fina kliento.
2. La magazino La Karavelo ne aboneblas. La LK-numeroj unuope vendeblas. La reta versio, por perkompuita legado, estas senpaga. Prenu ĝin el: www.lakaravelo.net
3. Mendu la LK-varojn al la esperanto-organizo plej proksima de vi. Se via esperanto-asocio ankoraŭ ne estas LK-revendanto, proponu tion al ĝi. Vi aŭ ĝi informiĝu ĉe lakaravelo@gmail.com
4. Kondiĉoj por revendantoj - por 5 varoj: 20% - por 10 varoj: 35%. LK aldonos al la prezo la valoron de la sendokostoj, pri kiuj la revendanto estos informata. La pago devas anticipi la sendon de la varoj, kaj ĝi okazos per depono en bankkonto de LK (informota) aŭ al la UEA-konto: **jmqs-l**
5. Aliaj kondiĉoj povas okazi laŭ interkonsentoj kun ĉiu revendanto.

LK-revendantoj (laŭ alfabeto ordo)

Brazila Esperanto-Ligo	Tel.: (61) 3226-1298	bel@butiko
Portugala Esperanto-Asocio	Tel.: 217 141 359	contacto@esperanto.pt
Universala Esperanto-Asocio	http://katalogo.uea.org/	libroservo@co.uea.org



João José Santos

joaojosesantos@gmail.com

Ĉu esperanto havas ajnan utilon?

Enkonduko

Emas la esperantistaro agnoski duone honteme, ke efektive esperanto "nur" taŭgas por amikeco, "nur" taŭgas por literaturamantoj, "nur" taŭgas por vojaĝemuloj, kvazaŭ tiuj ne estus bonegaj motivoj por lerni ĝin.

Estas sciate, ke dum la Dua Monda Milito, naziaj esperantistoj helpis judajn esperantistojn, tamen eĉ tio ne ŝajnas esti motivo sufiĉe konvinka por agnoski la utilon de esperanto. Esperanto devas solvi, laŭ kelkaj homoj, realajn problemojn de la nuntempa vivo.

En socio kies plej adorata dio estas Mono, esperanto devas ĝin servi aŭ... ĝi estas senutila lingvo.

Iom da ĵusa historio


En 2007, kiam naskiĝis La Karavelo, ĝia fondinto loĝis en Estremozo, urbeto en Alenteĝo, Portugalio. Mia antaŭa translokiĝo el Lisbono al Transmonto (nordorienta regiono de Portugalio) kaj de tie al Alenteĝo, jam tiam okazis pro strebo fiksiĝi en landinterno, kie eble estus pli facile trovi dungon kiel instruisto. En Alenteĝo mi trovis dungon nur dum unu jaro, kaj de tiam min kaptis nesolvebla maldungeco, kiu min devigis reveni al Lisbono por privata instruado. Kiam la ekonomia krizo en Portugalio profundiĝis, la privataj gelernantoj rariĝis, kaj la ekonomia vivo de la redaktisto trafis neelireblan situacion en Portugalio.

Post pripensa kaj responsa taksado de la eblecoj, nur la elmigrado sin prezentis kiel konvena rimedo por tiom aflikta situacio.

Diversaj landoj figuriĝis kiel bonaj solvoj. Inter ili okupis la unuan lokon Angolo kaj Brazilo. Rapide la ideo elmigri definitive al Brazilo prezentiĝis kiel la plej bona solvo por la premanta problemo. Ja la lingvo estas la sama, Brazilo kaj Portugalio interhavas multajn politikajn interkonsentojn, kiuj favoras la civitanojn de ambaŭ landoj kiam ili translokiĝas en la alian, la klimato de Brazilo estas tre agrabla, kaj la popolo varme gastigema. Plejmulte mi informiĝis pri Brazilo, kaj mi flugis en januaro 2012 al la 47-a Brazila Kongreso de Esperanto en Tagvatingo, urbo 21 km for de la ĉefurbo Braziljo. La sperto estis tre bona. Tiam la vivsperto min asertis, ke Brazilo estiĝos mia dua lando. Mi revenis al Lisbono planante reveni kiel eble plej baldaŭ al Brazilo, por tie fiksiĝi.

En la 19-a de majo 2012, mi surteriĝis en flughaveno de Rioĵaneiro (subŝtato: Rioĵaneiro), kaj en la sama nokto mi vojaĝis al Juizforo (subŝ.: Mino). Post kelkaj semajnoj, la destino min ŝutis en Makaeon (subŝ.: Rioĵaneiro), ĉefurbo de la brazila petrolo. Tiuj du urboj ne ŝajnis taŭgaj por miaj celoj, precipe pro manko de ebleco dungiĝi kiel instruisto. De Makaeo, mi revenis al la laborista Tagvatingo, kie mi estis en januaro.

En Tagvatingo Suda mi loĝas nun, kun planoj por du aŭ tri jaroj, kaj ĉi tie mi trovis mian unuan laboron en Brazilo, instruante brazilan literaturon en mezgranda privata mezlernejo. Burokrata proceso ankoraŭ iom absorbas min ĝis la ekhavo de porĉiama laborvizo, kiu rajtigos min pluloĝi en Brazilo trankvile, sen leĝaj problemoj.



Ponto JK, en
Braziljo.
Homaĝe al
Juscelino
Kubitschek.

Lernu la anglan kaj havu fortikajn krurojn

Pro tio, ke mi scipovas la anglan kaj havas fortikajn krurojn, mi ŝparis multan monon en la vojaĝo de Lisbono al Rioĵaneiro. Efektive granda estis la prezdiferenco inter la vojaĝo per la portugalia *TAP* kaj la vojaĝo per la brita *British Airways*. Per BA mi ŝparis 650 eŭrojn. Sen la angla tre malfacile mi povus rilatiĝi kun la aviadaj gekelneroj, kaj sen ĝi malfacile mi povus gvidiĝi, per ŝildoj kaj per buŝinformoj tra la plurkilometra fughaveno *Heathrow* en Londono. Mia flugo startis de Lisbono al Londono, kaj poste per alia aviadilo, de Londono al Rioĵaneiro. Ne eblas ne diri, ke oni devas havi ankaŭ fortikajn krurojn por multege paŝadi ene de tiu flughaveno, inter ambaŭ aviadilejoj.

Do, se iu esperantisto vin asertos, ke la angla taŭgas nur por komerco, pensu ke per ĝi vi ampleksigas viajn kapablojn kaj povas ŝpari multan monon, precipe se vi havas fortikajn krurojn.

Kie vivi sen esperantista helpo?

Se mi ne scipovus la anglan kaj ne havus fortikajn krurojn, mi ne estus ŝparinta 650 eŭrojn, sed mi ŝparus multajn flughorojn. Tamen, sen esperanto mi entute ne povus elmigri en Brazilon.

Dum ĉirkaŭ du monatoj, mi gastis ĉe ses homoj. Nur unu el ili ne estis esperantisto. En du hejmoj en Ĵuizforo, en aliaj du en Makaeo, kaj en aliaj du en Braziljo. Ĉi tie mi esprimas mian elkoran kaj eternan dankon al tiuj homoj, kiuj ĝentile malfermis siajn pordojn, kuirejojn, gastĉambrojn kaj banĉambrojn al mia tiama necesbezono, kiam mia ununura enspeziga rimedo estis la vendado de kelkaj el miaj verkitaj libroj.

Sen esperanto, kiujn pordojn mi frapus? Kiel mi manĝus? Kiuj rekomendus min kaj informus min pri praktikaj aferoj en Brazilo? Iel eble tio eblus eĉ sen esperanto, sed multe pli dolorige, bezonante multe pli da tempo.

Jen la ĉielo: kiĉneto¹ kaj laboro

Nun mi loĝas en kiĉneto luita en Tagvatingo Suda, kaj instruas brazilan literaturon en mezlernejo, restarigante mian vivon en Brazilo tre laborige, alfrontante kelkan burokracion, sed kun la koro plena je espero. Nun mi povas repreni mian verkadan agadon kaj relanĉi La Karavelon.

Tra ĉi tiu vivada sperto, mi ne trovis nur anĝelajn homojn, sed pri tiuj la historio scios nur ke ili ekzistis.



Ĉe Lago Paranao,
en Braziljo.

Esperanto ja utilas

Certe la esperantistaro ne povas svingi esperantan flagon dirante: lernu esperanton, ĉar per ĝi vi sukcesos elmigri, se tio estas via celo. Tamen, la vero estas, ke kiam oni scias ion, kaj oni povas uzi tion por solvi gravajn problemojn en sia vivo, oni povas alveni al konkludo ke tiuj lernitaĵoj havis praktikan utilon.

Pli stulta ol la demando *Por kio taŭgas esperanto*, kvazaŭ la kulturo devus konstante klarigi intereson por sia ekzisto, estas la klopodo de ĉiuj ni esperantistoj respondi al tiuj stultaj demandoj. Tamen, ni ne havas alian eblecon ol ludi la ludon de la stulteco, dum la mondo ne komprenas, ke ĝi nur ekzistas, ĉar ekzistas amo kaj kulturo.



¹ Kiĉneto: eta loĝejo, kiu konsistas plejofte el kuirsaloneto, dormoĉambro kaj eta banĉambro.



Gerrit Berveling

trad. el la Latina kaj notis

La Nuptokritikanta¹ aŭ La Geedzeco

**Deziderio Erasmo
el Roterdamo²**

Legu la unuan parton de ĉi tiu interesa dialogo, en La Karavelo 26. Ĉi tiu dua parto finas la babilon inter Ksantipa kaj Eŭlalia, en kiu ĉi tiu konsilas la amikino pri geedzaj aferoj. (JJS)

Ksantipa: Kiel do?

Eŭlalia: Kiam li estas libera de zorgoj, ne emocia, nek zorgoplena, nek ebria; tiam – sen ĉeesto de iu ajn atestanto – oni devas admoni lin, aŭ prefere peti lin, ke en ĉi tio aŭ io alia li pli bone prizorgu sian posedaĵon, aŭ sian famon, aŭ sian sanon. Kaj tia admono mem estas spicenda per ŝercaĵoj aŭ humuro. Foje mi kutimas komenci ĉe la antaŭaverto, ke li bonvole ne ekkoleru, se mi kiel stulta virino donas al li iun admonon, ĉar miatakse tio utilas por lia honoro, lia sano aŭ bonfarto. Kaj kiam la admonon, kiun mi volis, mi donis, mi tranĉas la temon kaj transiras al pli agrabla temo. Ĉar, Ksantipa, tio ĉi estas pli malpli nia komuna eraro³, ke se ni ekparolas, malfacile la finon ni trovas.

Ksantipa: Tiel oni diras.

Eŭlalia: Unue pri tio mi bone atentis, ke neniam mi riproĉu al mia edzo en ĉeesto de aliaj homoj, aŭ ke mi ne elportu iun ajn plendon ekster la domon. Se oni traktas ion inter si mem duope, estas multe pli simple ripareble. Sed se io okazis, kion ne eblas toleri, kaj ankaŭ ne eblas reĝustigi pere de edzina admono, tiam estas pli saĝe, ke la edzino portu la plendon al la gepatroj kaj parencoj de la edzo, ol al siaj propraj, por tiel

kvietigi la problemon, por ke ŝi ne ŝajnu malami la edzon, sed prefere la malbonan econ de la edzo. Sed tamen ne ĉion ŝi elbabilu, por ke senvorte li rekonu kaj amu la konsideron de la edzino.

Ksantipa: Por tion sukcesi, ŝi devus esti filozofo!

Eŭlalia: Ho ne, per tia agado niajn edzojn ni revokos al simila ĝentileco.

Ksantipa: Tamen kelkajn korektus neniu ĝentileco.

Eŭlalia: Tion miaflanke mi ne kredas. Sed eĉ, se tiel estus. Minime pensu jene: la edzon necesas elteni, kia ajn li estu. Estas preferinde, se oni devas elteni iun, kiu onin similas, aŭ kiun oni iom pliĝentiligis per nia reago, ol iun kiun nia sovaĝeco tag-post-tage pliaĉigis. Kion vi dirus, se mi povus montri edzojn, kiuj estis korektitaj de siaj edzinoj? Kiom pli decus, se ni kapablus fari ion similan al niaj edzoj!

Ksantipa: La ekzemplo, kiun vi povos prezenti, apenaŭ povus simili al mia edzo.

Eŭlalia: Mi konas iun nobelon, kiu estas klera, kaj plene flegita en ĉiuj specoj de socia rilatado. Li edziĝis al virgulineto deksepjara, kiu ĉiam rure⁴ vivis kun la gepatroj, kiel la nobeloj ja ŝatas loĝadi rure, pro ĉasado kaj birdkaptado. Senkulturan junulinon li deziris, por ke laŭ sia vivstilo li formu ŝin: li komencis instrui al ŝi poezion kaj muzikon, kaj iom post iom li kutimigis ŝin, redoni tion, kion en la prediko ŝi aŭdis, kaj li instruis ĉiujn ceterajn aferojn, kiuj povus esti por ŝi poste utilaj. Ĉar ĉio ĉi estis tute nova por la knabino, kiu hejme nur vivis en plena neniofarado kaj kiu edukiĝis inter servistara babilado kaj ludado, ŝi eksentis rezistemon kontraŭ tio. Ŝi komencis iĝi obstina, kaj se la edzo pri io urĝis ŝin, ŝi senfine ploris, foje sin eĉ ĵetis planken, vundis al si la kapon, kvazaŭ la morton ŝi serĉus. Kiam pri tio fino ne estis trovebla, la edzo – kaŝante sian koleron – invitis la edzinon, ke por malstreĉiĝo ili kune foriru al la ruro, al la domo de la bopatro. Tien la edzino kun plezuro lin sekvis. Kiam tie ili alvenis, la edzo lasis sian edzinon apud ŝiaj patrino kaj fratinoj; li mem kun la bopatro iris ĉasi. Sen ĉeesto de atestantoj li rakontis al la bopatro, ke li atendis agrablan vivkunulinon; sed ke nun li havas daŭre plorantino, kiu sin priplendas kaj ne estas sanigebla per iaj ajn admonoj: li petis, ke li apogu lin ĉe la kuracado de l' malsano de la filino. La bopatro respondis, ke li ja donis al li sian filino, kaj se ŝi ne obeas al liaj diroj, li uzu sian rajton kaj korektu ŝin per batoj. Tiam diris la bofilo:

¹ Greklingve en la originalo.

² Dua kaj lasta parto el la verko aperonta en *Antologio Latina* volumo 11, ankoraŭ verkata.

³ Ĉi tiu "nia" signifas "ina", laŭ mia interpreto. (JJS)

⁴ kampare (JJS)

Mi konas mian rajton; sed mi preferus, ke per via ruzo aŭ per via aŭtoritato ŝi saniĝu, prefere ol ni venu al la ekstremo. La bopatro promesis kuraci ŝin. Unu aŭ du tagojn poste li serĉis tempon kaj eblon, por esti sola kun la filino: kun mieno, kiu ŝajnigis severecon, li komencis diri al ŝi, kiel aĉe ŝi aspektas, kiel malmulte aminda estas ŝia konduto, kiel ofte li timis, ke por ŝi li ne trovos edzon. *Sed – li diris – dank’ al mia plej granda penado, mi tamen trovis tian edzon por vi, kian iu ajn virino povus deziri, kiel ajn feliĉa ŝi estu. Kaj tamen vi, ne rekonante, kion por vi mi atingis, ne komprenante, kian edzon vi havas, kiu, se li ne estus plej humana, apenaŭ tolerus vin inter siaj servantinoj, vi ribelas kontraŭ li!* Mallonge – la paroloj de la patro tiel ekflamis, ke nur pene li povis regi siajn manojn. Li ja estas viro ekstreme ruza, kiu sen masko povus ludi ajn rolon en kiu ajn komedio. La knabino, parte pro timo, parte tuŝita de la vero, falis antaŭ la patro surgenuen, petante, ke li bonvole pardonu al ŝi ĉion okazintan, kaj ŝi promesis por la estonto, ke ŝi obeos sian taskon. La patro pardonis, kaj promesis, ke ankaŭ li estos la plej amplena patro, se sian promeson ŝi plenumos.

Ksantipa: Kaj poste?

Eŭlalia: La knabino foriris el la interparolo kun la patro, reiris al la dormoĉambro kaj tie trafis la edzon sola. Ŝi iris al li, genuiĝis kaj diris: *Mia edzo, ĝis nun mi ne konis vin, nek min mem. Poste vi vidis, ke mi fariĝas alia, nur forgesu la pasinton.* Tiun ĉi diron la edzo respondis per kiso, kaj promesis al ŝi ĉion, se ŝi restos fidela al sia promeso.

Ksantipa: Kaj? Ĉu ŝi restis fidela?

Eŭlalia: Ĝismorte. Nenio estis tiel humila, ke ŝi ne volonte plenumu ĝin, se la edzo deziris. Tia amo estis naskita inter ambaŭ kaj firmigita. Post kelkaj jaroj la knabino ofte gratulis sin mem, ke ŝi trafis la bonŝancon edziniĝi al tia edzo; *se tio ne okazus – ŝi diris – mi estus la plej malfeliĉa el ĉiuj virinoj.*

Ksantipa: Da tiaj edzoj la nombro estas ne malpli eta, ol da blankaj kolomboj.

Eŭlalia: Se al vi ne estas tede, mi ŝatus rakonti al vi pri edzo, kiu estis korektita dank’ al la prudenta agado de la edzino, kaj tio okazis antaŭ nelonge ĝuste en tiu ĉi urbo.

Ksantipa: Mi ja havas nenion por fari, do via rakontado estas al mi tute bonvena.

Eŭlalia: Li estis viro plej nobela. Kiel kutimas ĉe tiu homspeco, li kutimis ofte ĉasadi. Rure li trafis knabinon, filinon de plej malriĉa virineto. Al ŝi li ĝisperee enamiĝis, kvankam li jam estis viro de granda aĝo. Pro ŝi regule li tranoktis ekstere. Lia preteksto estis la ĉaso.

Lia edzino, sinjorino de atentinda saĝeco, suspektante mi ne scias kion, elspuris la kaŝitaĵojn de la edzo. Kiam li estis for, mi ne scias kie, ŝi aliris al tiu rura kabano, kaj ŝi elfiŝis lian tutan faradon, kie li dormis, el kio li trinkis, kia ilaro estis en la domo. Estis tie nenio en la domo, sed nura malriĉo. Hejmen iris la matrono, kaj baldaŭ revenis, kun komforta lito kaj manĝilaro, kelkaj arĝentaj vazoj. Ŝi aldonis monon, rekomdante, ke se foje li revenos, ili traktu lin ĝentile. Intertempe ŝi tenis sekreta, ke ŝi estas lia edzino, ŝajnigante sin lia fratino. Post kelkaj tagoj tien revenis kaŝe la edzo. Li vidis la pli grandan ekipaĵon, la manĝilon pli luksan. Li demandis de kie venas tiu nekutima brilo. Ili diris, ke iu bonfara matrono parenca al li tion alportis, kaj ke ŝi deziras, ke ili akceptu lin poste pli honore. Tuj trafis lian animon la suspekto, ke estas faro de lia edzino. Hejmenirinte, li demandis, ĉu estis ŝi. Ŝi ne neis. Li demandis, kun kia intenco do ŝi sendis tien la aferojn. *Mia edzo – ŝi diris – vi kutimas je komforta vivo. Mi vidis, ke tie vi estas akceptata senlukse; mi opiniis, ke estas mia tasko, ke, se tiel plaĉas al vi, vi tie povos tranokti pli plezure.*

Ksantipa: Ho tro bona matrono! Anstataŭ ĉi lito prefere mi metus sub lin faskon da urtikoj aŭ kardoj.

Eŭlalia: Sed aŭskultu la finon. Kiam la viro konstatis ĉi korbonecon kaj mildon de l’ edzino, li poste neniam uzis eblon je adulto; sed hejme li kontentigis sin kun sia propra edzino. – Vi ja konas Gilberton, la Holandanon, ĉu?

Ksantipa: Mi konas lin.

Eŭlalia: Kiel vi scias, en la florado de sia aĝo li prenis edzinon, kiu estis oldiĝanta kaj jam pasis la kulminon.


Ksantipa: Doton eble li edziĝis, ne edzinon.

Eŭlalia: Tiel estas. Kiam pri sia edzino li eknaŭzis, li enamiĝis je virineto, kun kiu regule li amuzis sin eksterdome. Malofte hejme li manĝis tage aŭ vespere. Kion tiam vi estus faronta?

Ksantipa: Kion? Mi flugus al lia amatino en la harojn, kaj se la edzo elirus eksteren al ŝi, mi priverŝus lin per tiom da parfumo, ke kvazaŭ lavita li iru al la festeno.

Eŭlalia: Ho – sed ŝi, kiom pli saĝe faris! Ŝi invitis la sinjorineton al sia domo, afable bonvenigis ŝin. Ankaŭ la edzon tiel do sen sorĉrimedoj ŝi logis hejmen. Kaj se kelkfoje tamen li manĝis kun ŝi ekstere, ŝi sendis ion eskvizitan⁵ tien, kaj deziris al ili agrablan kunestadon.

⁵ "rave delikatega" (JJS)



Du tahitianinoj kun mangofloroj (1899).
Franca pentristo Paul Gauguin (1848-1903).

Ankaŭ ĉi tiuj inoj ŝajnas ion
konfidenci, kiel Ksantipa kaj
Eŭlalia, malgraŭ la anakronismo.

el Vikipedio

Ksantipa: Ho, mi prefere mortus, ol esti perantino por mia edzo!

Eŭlalia: Tamen pripensu denove. Ĉu ne estis multe pli saĝe, ol se en kolero ŝi fremdigus la edzon de si, kaj pasigus la tutan tempon en malpaco?

Ksantipa: Mi koncedas, ke estus malpli aĉe; sed mi ne povus⁶.

Eŭlalia: Unu rakonton mi ankoraŭ aldonos, kaj tiel mi finos la ekzemplojn. Najbaro nia ĉi tie, bonulo kaj taŭga viro, sed iom kolerigema, iutage frapis sian edzinon, plej bone konatan virinon. Ŝi retiriĝis en plej intiman ĉambron, kaj tie plorante kaj singultante ŝi ventumis sian ĉagrenon. Iom poste hazarde envenis tien la edzo. Li trovis ŝin ploranta. *Kio – li diris – estas ĉi larmoj kaj singultoj?, vi ne estas infano!* Tiam ŝi reagis tute saĝe: *Kio? – ŝi diris – Ĉu ne sufiĉas, ke ĉi tie mi priploras mian malfeliĉon? Ĉu vi preferus, ke surstrate mi elkriu ĝin, kiel aliaj virinoj kutimas fari?* Trafita kaj venkita estis la animo de la viro de tiu ĉi tiom edzineca diro. Li donis al ŝi la dekstran manon kaj promesis, ke poste neniam li plu batos ŝin. Kaj li ankaŭ ne plu faris tion.

Ksantipa: Mi atingis la samon de la mia per alia metodo.

Eŭlalia: Sed intertempe estas daŭra milito inter vi.

Ksantipa: Kion viaopinie mi devus fari?

Eŭlalia: Unue ĉiun maljustaĵon de via edzo vi silente glutu, kaj lian animon iom post iom vi konkeru per servopreteco, afableco, dolĉeco. Aŭ fine vi venkos lin, aŭ certe vi pli plaĉe rilatos kun li ol ĝis nun.

Ksantipa: Li estas tiom feroĉa, ke mi ne povos malsovaĝigi lin per servopreteco.

Eŭlalia: He, tion ne diru! Neniu besto estas tiel abomena, ke per adaptiĝemo ne eblus malsovaĝigi ĝin. Ankaŭ do pri homo ne malesperu. Faru provon de kelkaj monatoj. Kulpigu min, se vi ne konstatos, ke ĉi konsilo estas al vi utila. Ekzistas tamen kelkaj malvirtoj, kiujn necesas pretervidi. Tion unuavice mi opinias, ke vi atentu. Ne kverelu en la dormoĉambro, aŭ en la lito. Sed atentu, ke tie ĉio estas gaja kaj agrabla. Se ja tiu loko, kiu estas intencita por forigi ofendojn aŭ por ripari bonvolemon, profaniĝas per malpaco aŭ ia mis-etoso, tiam ja ĉiu rimedo por reakiri bonvolemon pereis. Ekzistas virinoj tiel grumblemaj, ke eĉ dum la sekskuniĝo mem ili plendas aŭ kverelas. Kaj do tiun volupton, kiu kutime forigas ĉion naŭzan el la animoj de la viroj, ili faras malplezuro per sia abomena konduto, venenante la sanigilon mem, dum per ĝi eblus kuraciĝi.

Ksantipa: Tio al mi okazis regule.

Eŭlalia: Kaj tamen, kvankam la edzino ĉiam atentu, ke al sia edzo ŝi neniumaniere estu ĝena, precipe tion ŝi alstrebu, ke ĉe sekskuniĝo ŝi proponu sin al la viro ĉiurilate preta kaj agrabla.

Ksantipa: Jes "al viro", sed mi rilatas "al besto".

Eŭlalia: Ĉesu fiparoli! Kutime niakulpe la viroj estas malbonaj. Sed mi revenu al la temo. Tiuj, kiuj okupiĝas pri malnovaj rakontoj, diras, ke Venera – kiu estas konsiderata kiel ŝirmantino de la nupto – portas rimenon⁷, kiun faris la arto de Vulkano. En ĝi enteksiĝis ĉiuj amaj rimedoj. Per ĝi ŝi sin ornamas, ĉiufoje kiam ŝi kuniĝas al sia edzo.

Ksantipa: Mi aŭskultas la fabelon.

Eŭlalia: Certe, sed komprenu, kion celas diri tiu fabelo.

Ksantipa: Diru do.

⁶ Oni subkomprenas: "Mi ne povus tiel kondukti." (JJS)

⁷ Iliado 14: 188-224.

Eŭlalia: Ĝi instruas, ke la edzino devas apliki ĉiun zorgon, por en la geedza sekskuniĝo esti agrabla al la edzo, por ke li reardu kaj ke tiu geedza amo renoviĝu, kaj ke, se okazis io malagrabla aŭ naŭza, tio disskuiĝu el la koro.

Ksantipa: Sed kie ni trovas tiun rimenon?

Eŭlalia: Sorĉformuloj aŭ venenaj trinkaĵoj ne necesas. Neniu sorĉaĵo estas pli efika, ol virta ĝusteco kunigita kun agrableco.

Ksantipa: Tian edzon⁸ mi ne povas kaĵoli.

Eŭlalia: Sed estas via intereso, ke sian estmanieron li ĉesu. Se per la arto de Circa⁹ vian edzon vi povus ŝanĝi en porkon aŭ urson, ĉu tion vi farus?

Ksantipa: Mi ne scias.

Eŭlalia: Ĉu vi ne scias? Aŭ ĉu vi preferus havi porkon kiel edzon, ol homon?

Ksantipa: Mi miaflanke homon preferus.

Eŭlalia: Nu, kio do, se per la arto de Circa el drinkemulo vi povas fari sobrolon, el disipanto ŝparemulon, el pigrulo diligentulon, – ĉu tion vi ne farus?

Ksantipa: Klare ke mi farus. Sed kie trovi tian arton?

Eŭlalia: Tian arton vi havas en vi mem, se vi nur pretas ekuzi ĝin. Li ja estas – ĉu vi volas ĉu ne volas – via edzo. Ju pli bona lin vi faras, des pli bone vi zorgas pri vi mem. Vi nur direktas viajn okulojn al liaj malbonaj flankoj, kaj via malamo pligravigas ilin; kaj vi ĉiam ekprenas lin per la tenilo, per kiu ne eblas teni lin. Prefere atentu tion, kio estas bona en li; kaj ekprenu lin per tiu tenilo, per kiu vi povas teni lin. Antaŭ ol vi edziniĝis, estis la momento ekpesi, kion li havas da malbonaj flankoj. Ĉar ne nur per la okuloj, sed ankaŭ per la oreloj vi devis elekti la edzon. Nun estas tempo ripari, ne kulpigi.

Ksantipa: Sed kiu edzino elektis la edzon per la oreloj?

Eŭlalia: Per okuloj elektas tiu, kiu nur rigardas pri la formo de la korpo; per oreloj <elektas tiu>, kiu atente observas, kion la famo pri li sciigas.

Ksantipa: Bela admono, sed iom malfrua.

Eŭlalia: Sed ne tro malfruas strebi plibonigi la edzon. Al tio kontribuas, se via edzo ricevos el vi infanon kiel garantiaĵon de via amo.

Ksantipa: Jam naskiĝis.

Eŭlalia: Kiam?

Ksantipa: Jam delonge.

Eŭlalia: Depost kiom da monatoj?

Ksantipa: Pli malpli sep.

Eŭlalia: Kion mi aŭdas? Ĉu la konatan ŝercon pri la trimonata feto vi renovigas?

Ksantipa: Tute ne.

Eŭlalia: Tamen nepras ja, se kalkuli depost la tago de via nupto.

Ksantipa: Male, jam antaŭ la nupto mi parolis kun li.

Eŭlalia: Ĉu el konversacio naskiĝas la beboj?

Ksantipa: Hazarde li trafis min sola. Li komencis petoli, tiklante la akselojn, la flankojn, por fari min ridi. Mi ne eltenis la tikladon, mi metis min surdorsen sur la lito; li ekkuŝis super mi, donis kisojn, kaj mi ne vere scias, kion krome li faris. Certe post malmulte da tempo mia utero komencis ekŝveli.

Eŭlalia: Nu, ek! Malŝatu tiun edzon! Se dumludade li generas infanojn, kio do okazos, se la aferon li prenos serioze?¹⁰

Ksantipa: Mi suspektas, ke denove mi estas graveda.

Eŭlalia: Bone, fekundan teron trafis bona pluganto.

Ksantipa: Tiurilate li kapablas pli ol mi dezirus.

Eŭlalia: Pri tio plendas ege malmulte da virinoj. Sed tiutempe inter vi jam estis ja fianĉiĝa kontrakto?

Ksantipa: Jes.

Eŭlalia: Do estas nur eta peko¹¹. – Ĉu estas knabeto?

Ksantipa: Jes.

Eŭlalia: Li do ree faros vin geamikoj, se vi iom adaptiĝos. Kion krome pri via edzo diras liaj kamaradoj, la homoj, kun kiuj li ekstere havas rilatojn?

Ksantipa: Ili diras, ke li estas agrabla kunulo, ĝentila, amiko por la amikoj.

Eŭlalia: Ankaŭ tio donas bonan esperon al mi, ke li estos tia, kia ni lin ŝatas.

Ksantipa: Sed al mi sola li ne estas tia.

Eŭlalia: Sed prezentu vin al li tia, kia mi

⁸ Subkomprene "Tian edzon, kia estas la mia..." (JJS)

⁹ Circa estis sorĉistino, kiu, en Odiseado, transformis la amikojn de Uliso en porkojn kaj aliajn bestojn. (JJS)

¹⁰ Eŭlalia ironias. (JJS)

¹¹ Laŭ katolika regulo estas peko seksumi antaŭ aŭ ekster geedziĝo.

diris. Ne plu nomu min Eŭlalia, sed Pseŭdolalia¹², se ankaŭ al vi li ne fariĝos tia¹³. Sed pensu ankaŭ pri tio, ke li estas ankoraŭ juna. Mi kredas, ke li apenaŭ estas dudekkvarjara. Li ankoraŭ ne scias, kio estas esti familia patro. Vi ankoraŭ ne devas pensi pri divorco.

Ksantipa: Sed oftege mi pensis pri ĝi.

Eŭlalia: Se tia penso ree trafos vin, unue vi bone pripensu, kia mizera estaĵo estas virino divorcinta de sia edzo¹⁴. Estas pleja gloro de la matrono obei al la edzo. Tion ordonis la naturo. Tiel ĝin volis Dio, ke la virino komplete dependu de la viro. Pensu, kio estas la afero: li estas via edzo, alian ekhavi estas neeble. Poste vi memoru, ke tiun fileton vi havas komune. Kion pri li vi planas? Ĉu vi volas kunporti lin kun vi? Ĉu vian edzon vi senigos de lia posedo? Ĉu vi lasos lin ĉe li? Ĉu vin mem vi senigos de li, kiu estas por vi la klej kara? Diru do fine, ĉu vi havas homojn, kiuj deziras al vi malbonon?

Ksantipa: Mi havas plej tipan stifpatrinon¹⁵; krome mi havas bopatrinon, kiu pleje similas al ŝi.

Eŭlalia: Ĉu ili estas tiel aĉ-volaj?

Ksantipa: Ili ŝatus min morta.

Eŭlalia: Ankaŭ tiujn vi do bone memortenu. Kion vi ja povus fari pli plaĉan al ili, krom se ili vidus vin disigita de la edzo, vivanta kvazaŭ vidvino, ja pli ol kvazaŭ vidvino? Ĉar <normalaj> vidvinoj rajtas reedziniĝi.

Ksantipa: Via konsilo estas saĝa, sed ĉagrenas min la longa penado.

Eŭlalia: Sed pensu, kiom da penoj kostis al vi, por instrui ĉi papagon sonigi homajn vortojn.

Ksantipa: Sufiĉe multe ja!

Eŭlalia: Kaj ĉu la peno, kiun kostus por formi la edzon, ke vi trapasu kun li agrablan vivon, naŭzas vin? Kiom da peno elspezas la homoj, por adapti al si ĉevalon? Kaj ĉu al ni naŭzus apliki tion, por fari la edzon pli manipulebla?

Ksantipa: Kion mi faru?

Eŭlalia: Mi jam diris. Zorgu, ke hejme ĉio brilu, ke ne estu ĝenaĵo, kiu pelus lin ekster

la domon. Montru vin de via bona flanko, daŭre memoru la respekton, kiun la edzino ŝuldas al la edzo. Ne estu trista; sed ankaŭ ne estu tro frivola. Ne estu mucida nek lasciva. La domaranĝo aspektu bona. Vi konas la guston de la edzo: kion li pleje ŝatas, tion preparu. Ankaŭ al tiuj homoj, kiujn li amas, vi montru vin afabla kaj plaĉa. Tiujn ofte vi invitu al la manĝo. Dum la manĝo faru, ke ĉio estu ĝoja kaj bonhumora. Kaj se foje li iom tro gaje ekludas la liron, vi do kunkantu kun li. Tiel vi kutimigos la edzon resti hejme, kaj la elspezojn vi malpliigos. Tiel fine li ekpensos: *Jes, kiel stulta mi estas, ke ekstere kontraŭ grandaj elspezoj kaj koste je mia bona nomo mi vivu kun putino, dum hejme mi havas edzinon multe pli gracian, kiu multe pli amas min, kaj ĉe kiu mi kun multe pli da plezuro estas bonvena?*

Ksantipa: Ĉu vi kredas, ke mi sukcesos, se mi provos?

Eŭlalia: Vidu min! Vidu, kiel mi sukcesis. Intertempe mi iros al via edzo; mi admonos lin pri lia tasko.


Ksantipa: Vian konsilon mi laŭdas. Sed atentu, ke nenion el ĉi tio li ekflaru! Li povus renversi ĉion.

Eŭlalia: Ne timu. Mi direktos mian paroladon per tiaj ĉirkaŭvojoj, ke li mem rakontos al mi, kiu vetero regas inter vi. Kaj poste, miamaniere mi traktos lin lerte, kaj, kiel mi atendas, redonos lin al vi pli manipulebla. Pri vi pretere mi mensogetos, kiel amplene vi parolis al mi pri li.

Ksantipa: Kristo apogu nian entreprenon.

Eŭlalia: Li faros, se vin mem vi ne delasos.

Fino



¹² Ambaŭ nomoj estas Grekaj: Eŭlalia – tiu kiu bone parolas; Pseŭdolalia – tiu kiu mensoge parolas.

¹³ Subkomprene "... afabla kiel al la amikoj." (JJS)

¹⁴ Oni memortenu la epokon!

¹⁵ Do: malbonan – laŭproverbe. Stifpatrino estas edzino de la patro.



Lago Paranoao Braziljo



Mesaço de Fernando Pessoa

ANTAŬNOTICO PRI LA LIBRO

João José Santos



Post la kompleta publikigado de la poezia verko *Mesaço*, de la portugalia poeto Fernando Pessoa (PT Fernando Pessoa), en siaj magazinaj paĝoj, La Karavelo prilaboras nuntempe la eldonadon de ĉi tiu verko libroforme. Por tio, la traduko estas tute reviziata de la tradukisto mem. Oni antaŭpublikigas ĉi tie la Dediĉon kaj la Postverkon aperontajn en la verko. Ankaŭ ili estas poemoj pro ĝenra agordiĝo.

Traduko, notoj, kromtekstoj, kompostado kaj eldono de João José Santos.



Dediĉo

Al specialaj homoj

Al specialaj homoj kiuj estas
en ambaŭ riverflankoj de l' ekzisto,
dediĉas ĉi-bukedon tradukisto
servinte al kulturo, kiu restas.

En vivoj malsimilaj ili nestas:
ja kelkaj kleras, tamen kun insisto
aliaj diras ke libr' estas listo
tre peza, kiu ĝojon forarestas.

En vintro ili estas mia suno,
ridetoj varmigantaj mian koron.
Somere kune revas ni sur duno.

Sen am' ilia sentus mi hororon
de l' solo, kaj la vivo estus puno.
Kun ili sentas mi la Di-fervoron.

João José Santos
(Lisbono, 2012-03-01)



Postverko

Al Fernando Pesoo

Ni strebas tra mil jaroj kun tenero
al glor' eterna por Portugalio.
El tio ŝvebis Kvina Imperio,
el tio vervis nia verka vero.


Por pan' ni navigadis tra la Tero,
sed mankas ĝi en nia historio.
Sen pan' al ni emerĝas poezio
sur vojo orumita per sufero.

Nun lanĉas sin denove la ŝakaloj
por kapti nian landon apatian.
Perfido putre regas en maskbaloj.

Kaj ni plu bakas tempon poezian,
sen pan', sen hav', sen sav'... en larmovaloj.
Hor' estas serĉi sorton pli varian.

João José Santos
(portugalo kiel vi)
(Lisbono, 2012-03-06)





Luiza Carol

Ostap Bender fascina romanheroo

Pri la romanoj *Dek du seĝoj* kaj *Ora bovido* de Ilja ILF kaj Jevgenij PETROV, esperantigitaj de Aleks KERBEL.

La du famaj humuraj romanoj de Ilf kaj Petrov estas samtempe amuzaj kaj pensigaj, miksantaj akran satiron kun gaja humuro kaj aparta poemeco. En tiuj romanoj, oni konatiĝas kun la bunta socia etoso en Sovetunio antaŭ la dua mondmilito. Per sia ironio, la aŭtoroj kritikas socialismajn kaj kontraŭsocialismajn ideojn, revoluciistojn kaj kontraŭrevoluciistojn, monarĥistojn kaj kontraŭmonarĥistojn, ateistojn kaj religiulojn... Fakte, same kiel la plej grandaj moralistaj humuristoj en la mondo, Ilf kaj Petrov malkaŝas ĝeneralajn homajn difektojn de ĉie kaj ĉiam. La aŭtoroj identiĝas kun neniu romanheroo kaj neniu ideologio. Ili malvarme spektas la homaran komedion, igante la leganton ridi kaj ĝui sinsekvajn riĉsignifajn ŝercojn. Tamen, foj-foje, delikata brizo de poemeco subite karesas la animojn de la legantoj, ĉar pormomente la malvarmecoj iom degeliĝas...

Dek du seĝoj kaj *Ora bovido* estas felietonaj romanoj, tre dramecaj (se la du aŭtoroj vivus nun, ili verŝajne verkus tekstojn por longegaj TV-serioj de felietonaj komedioj), kies ĉefa ligilo estas la komuna protagonisto: la enigma Ostap Bender, samtempe loga kaj abomeninda, sentema artisto kaj aĉa fripono.

Multtempe hantis min la demando: kial tiom malhonesta kaj egoisma protagonisto allogis tiom da naivaj admirantoj el inter la aliaj romanherooj (tiuĵn, kiuj fariĝis la viktimoj de liaj friponaĵoj) kaj ankaŭ inter la legantoj (kiel ekzemple min mem.) Kial? Eble precipe pro sia elstara talento pri aktorado, sed ankaŭ pro tio, ke preskaŭ ĉiuj aliaj herooj de la du Ostap-romanoj estas same malhonestaj kiel li, ofte eĉ pli aĉaj, do ili ne ŝajnas al ni tro kompatindaj, kiam ili fariĝas la viktimoj de liaj friponaĵoj. Tamen, kelkaj herooj el tiuj romanoj ja ŝajnas honestaj, aŭ almenaŭ ne malkaŝas siajn hontindajn pensojn al la legantoj. Kial do eĉ tiuj ne



Ilja Ilf and Jevgenij Petrov
Photo: E. Langman, 1932

sukcesas gajni nian simpatian pli multe ol la fripono Ostap? Eble pro tio, ke parto el ili estas stultaj aŭ tro naivaj, kiel ekzemple la vidvino Gricacujeva, enamiĝinta al Ostap. Tuta galerio de stultuloj troviĝas en la paĝoj de la du romanoj: nedanĝeraj, danĝeretaj, mezdanĝeraj kaj danĝeregaj stultuloj... Multegaj herooj agas aŭtomate, kiel mekanikaj pupoj manipolataj de blindigaj burokrataj leĝoj aŭ inertaj kutimoj. Oni povus diri, ke en ambaŭ romanoj la herooj estas senescepte akre primokitaj de la aŭtoroj, se ne troviĝus inter ili la unu sola senmakula heroo: la gardisto de la fervojista klubo en Moskvo. Tiu aperas je la fino de *Dek du seĝoj*, post kiam "la granda kombinanto" Ostap estas mortigita de sia partnero Vorobjaninov. La grandvalora juveltrezoro, kiun la duopo fervore serĉis dum multaj monatoj, ŝajnas senpure malaperinta... sed ĝuste tiam, la freneziga Vorobjaninov renkontas la personon, kiu tute hazarde trovis ĝin: la maljunan babileman gardiston de la fervojista klubo. Li bonkore kaj ĝoje rakontas al Vorobjaninov, kiel li trovis la trezoron en difektita remburita seĝo de la malnova klubkonstruaĵo, kiel li tuj prezentis ĝin al la klubestro, kiel la klubestraro tuj trovis la eblecon aliformigi ĝin en kalkuleblan monon, per kiu oni konstruis la belan kaj freŝan klubkonstruaĵon... Laŭŝajne, jen normala homo rakontas pri normala okazaĵo. Kial do tiu ĉi finaĵo de la unua Ostap-romano igas la leganton fini la libron per larmiga ridego? Ĉar kaj la heroo kaj lia rakonto estas amuzaj kliŝaj ekzemploj de politike-korekta arto. Post centoj da paĝoj de akra satiro de la tiamaj sovetaj sociaj aspektoj, post dekoj da portretoj pri friponoj, ŝtelistoj, subaĉetemuloj, avaruloj, aviduloj, burokratoj kaj ĉiuspecaj stultuloj... jen subite honesta normala homo trovas trezoron, donas ĝin al perfekte honesta klubestro... kaj oni senprokraste kaj senburokrate aliformigas la materian riĉaĵon en belan spiritan riĉaĵon: modernan klubon, servontan al kulturaj agadoj de sovetaj laboristoj kultursoifantaj... Kvazaŭ la tuta romano



Statuo pri Ostap Bender en Ĥarkov (Ukrainujo)

prezentis ĝis nun nur maloftegajn bedaŭrindajn esceptojn, kaj nur ĉe la fino aperas la rozkolora normalo... Jen brila ekzemplo de Ilf-Petrova humuro: tian romanfinon neniu sovetia cenzuristo povus forstreki, tamen ĝi iĝas plej akra primokado de la sovetia cenzuro mem kaj ankaŭ de la sovetia kliŝa literaturo.

La aktora talento de Ostap Bender kontribuas al la ambigueco de lia personeco. Kiel granda aktoro, Ostap "travivas" siajn rolojn. Li ne nur aktoras, sed ankaŭ kreas la tekstojn por siaj roloj: li ne parkeras rolojn elpensitajn de dramverkistoj, sed lerte improvizas diversajn rolojn laŭ cirkonstancoj. Li havas grandan psikologian komprenon de la roloj de li mem elektitaj, sed ankaŭ de la personecoj de la herooj kun kiuj li interrilatas. Li anticipas la reagojn de aliaj personoj, anticipas dialogojn, fulmrapide adaptas siajn planitajn strategiojn al neatenditaj realaĵoj kaj, same kiel ajna granda aktoro, ĝuas la aktoradon mem multe pli ol ajnan materian gajnon. Malsame ol aliaj friponoj, li neniam desperas kiam malgajnas monon, ĉar li ĝuas la aventuron mem, la belajn pejzaĝojn kiujn li vidas vojaĝante, siajn proprajn revojn... Li estas plene vivanta, malsame ol la plejmulto de burokrataj aŭtomatoj ĉirkaŭ li. Li kapablas ridi pri

amuzaj situacioj, eĉ kiam li mem fariĝas viktimo. Jen kial mi bedaŭris, kiam Ostap Bender estis mortigita, ĝuste antaŭ la fino de *Dek du seĝoj*. Sed evidentiĝis, ke bedaŭris ne nur mi, sed ankaŭ multegaj legintoj longtempe antaŭ mi, kiuj konvinkis la aŭtorojn revivigi la protagoniston kaj daŭrigi la Ostap-rakontojn en alia romano. En *Ora bovido*, Ostap revenas tute sana, samkiel aktoro kiu kapablas morti surscene kaj tuj poste leviĝi por kolekti aplaŭdojn. Nur unufoje li aludas al tiama preskaŭa morto, kiam li sentas la intencojn de Korejko mortigi lin. Li diras al Korejko:

«(...) Oni jam mortigis min unufoje. Estis tia malracia maljunulo el bona familio, iama gvidanto de nobelaro, kaj poste registristo de civilaj aktoj Kisa Vorobjaninov. Ni, kontraktiĝinte, serĉadis feliĉon je sumo da cent kvindek mil rubloj. Kaj jen, antaŭ divido mem de la akirita sumo, la stulta gvidanto tranĉ-batis mian kolon per razilo. Ho kiel tio estis banale, Korejko! Banale kaj dolore! Kirurgoj longe penis savi mian junan vivon, pro kio mi estas ege danka al ili. (...)»

En *Ora bovido*, Ostap Bender ŝajnas pli matura, kaj ankaŭ la aŭtoroj mem maturiĝis. Lia dialogo kun la kaŝita riĉegulo Korejko estas ege trafa por priskribi lian nekutiman personecon. Jen ĝi:



**Statuo pri Ostap Bender en Elista
(Kalmuka Respubliko en Rusujo)**

«(...) – Tiel oni ne ordigas aferojn, – diris Korejko kun vendista rideto.

– Povas esti, – suspiris Ostap, – sed, ĉu vi scias, mi ne estas financisto. Mi estas libera artisto kaj malvarma filozofo.

– Sed kontraŭ kio vi volas ricevi la monon? Mi perlaboris ĝin, sed vi...

– Mi ne nur laboris. Mi eĉ suferis. Post konversacioj kun Berlaga, Skombrieviĉ kaj Brulegov mi perdis kredon je homaro. Ĉu tio ne kostas milionon da rubloj, kredo je homaro? (...)»

Kiom longe Ostap povus brile ludi rolon de honesta homo, sen senti ajnan inklinon al honesteco en sia animo? Kaj kiom da fojoj li povus ludi la rolon de enamiĝanta viro, sen vere enamiĝi? Kiam Ostap sukcesis gajni la amon de Zosja, li ŝajnis ekheziti inter siaj du roloj: tiu de fripono kaj tiu de sentema artisto. La leganto povus anticipi, ke li rezignos pri tiu malbenita riĉaĵo, por ekvivi normalan vivon de edziĝanta viro, kiu honeste laboras por vivteni la familion... En la felietona versio de la romano, Ostap Bender ĝuste tiel finas siajn aventurojn de fripono! Sed la definitiva versio de la libroforme eldonita romano *Ora bovido* finiĝas tute alie. La "normala" vivo kiun Ostap povus akiri en

la tiamaj historiaj cirkonstancoj estus same senkolora kaj stulta kiel aspektas la vivo de Zosja kaj ŝia edzo (kiam la ĵus enriĉigita Ostap revenas al ŝi kaj trovas ŝin jam edziniĝinta). La lastaj 60 paĝoj de la libro, kiuj priskribas la travivaĵojn de la enriĉigita Ostap, konvinkas la leganton ke eĉ riĉegulo ne povis ĝui tre multajn avantaĝojn en tiuj apartaj historiaj cirkonstancoj. Ostap decidas forlasi la landon kaj elmigri en Brazilon. Li kunportas sian monon aliformitan en juvelojn, sukcesas transpasi la Rumanan landlimon ĉe la rivero Dnestro, sed... la rumantaj landlimgardistoj forrabas de li ĉion. *Ora bovido* finiĝas per la reveno de Ostap en Sovetunion, transpasante la degelantan riveron, sen riĉaĵoj, sed kun la sama sinteno de nevenkita aktoro:

«(...) Li eksaltadis sur la disŝoviĝantaj glacieroj, per ĉiuj fortoj hastante en la landon kun kiu li tiel digne adiaŭis nur antaŭ horo. La nebulo leviĝis, grava kaj malhasta, malkovrante la nudan kanaron.

Post dek minutoj sur sovetian bordon eniris stranga homo sen ĉapo kaj en unu boto. Al neniu rilatante li laŭte diris:

– Sen ovacioj, bonvolu! Esti grafo Monte Kristo mi ne sukcesis. Do ŝanĝu mi la profesion je dom-administranto. (...)»

Jen kiel "la granda kombinanto" Ostap Bender defias la morton ĉe la rivero Dnestro, elirante por ĉiam el la scenejo per memorinda monologo de kuraĝa aktorfripono. Se li sukcesus elmigri en Brazilon, lia vivo fariĝus same teda kaj sensignifa kiel ajna vivo de senbrila riĉegulo. Ĝuste la perdo de siaj riĉaĵoj igas lin konservi sian enigman karakteron.

La fino de *Ora bovido* pensigas la leganton pri la stranga fino de iu rakonteto, per kiu "la granda kombinanto" regas aron da ĵurnalistoj dum longa trajnveturado. Temas pri "Rakonto de Ostap Bender pri la eterna judaĉo", kiu baziĝas sur konata protagonisto de mezepoka legendo, sed kiun Ostap prezentas laŭ sia propra versio. Ankaŭ tiu rakonto finiĝas ĉe iu riverbordo, sed ĉi-foje temas pri la rivero Dnepro en Ukrainujo. La "eternan vagantan judon" kaptis la anoj de la ukraina sendependenca armeo, kaj jen kiel finiĝas la rakonto:

«(...) – Ĉu judaĉo? – demandis la hetmano kun gaja miro.

– Judaĉo, – respondis la vaganto.

– Do almetu vi lin al muro, – karese diris la estro.

– Sed mi estas eterna! – kriis la oldulo.

Du mil jaroj li senpacience atendis la morton, sed nun li subite tre ekvolis vivi.

– Silentu, ĵidaĉa muzelo! – gaje kriis la diklipa estro. – Haku lin, buboj-bravuloj!

Kaj la eterna vaganto malaperis.

– Jen estas ĉio – finis Ostap. (...)»

La simetrio de la du protagonistoj evidentas. Dum la eterna vaganta judo perdas sian eternecon ĉe la bordo de Dnepro, la alia vaganto, Ostap, iusence konkeras sian eternecon ĉe la bordo de Dnestro. Tio okazas ĉar post la fino de la dua romano, Ostap fariĝas legendo, kiun la leganto neniam forgesos.

La rakonto pri la eterna judo satire malkaŝas la fortan kontraŭjudismon, kiu ja ekzistis en Sovetunio, malgraŭ la kontraŭaj kliŝaj asertoj. La maniero per kiu la aŭtoroj realigas la satiron ĉirilatan estas aparte interesa: la ironio rezultas el la cirkonstancoj mem dum kiuj Ostap enigis tiun rakonton en la konversaciojn de la ĵurnalistoj. Nur nelonge antaŭ tiu rakontado de "la granda kombinanto", du sovetaj ĵurnalistoj klopodis konvinki judan usonan ĵurnaliston, ke en Sovetunio, kvankvam ja ekzistas judoj, malekzistas la juda problemo. Kaj jen Ostap, kiu ŝajnigas sin sovetaj ĵurnalistoj, rakontas al aro da veraj sovetaj ĵurnalistoj rakonton, en kiu li uzas la vorton "judaĉo" (en la rusa originalo, li uzas apartan fivorton, per kiu oni kutimis insulti

judojn) kaj neniu sovetaj ĵurnalistoj ekkoleras, neniu admonas lin, ke li ne uzu tian vorton. Jen plej travidebla ironio de kliŝa sovetia propagando... Oni povus ankaŭ mediti pri tio, ke la tiamaj sovetuniaj cenzuristoj ja preteratentis tiun ĉi ironion, alie ili estus forviŝintaj tiun vorton...

Ostap Bender ne estas abomeninda kruela fripono. Oni povus eĉ diri, ke li friponis "nur modere": li forprenis de Korejko "nur" milionon, post kiam li enriĉiĝis provis helpi al siaj eksaj partneroj ktp. Fakte li estas homo, kiu ne kapablas trovi sian taŭgan lokon en la vivo, tial liaj animaj maltrankvileco kaj malkontenteco puŝas lin ree kaj ree al la limo inter tragedieco kaj komikeco.

La bone konata sovetunia verkisto Valentin Katajev, la pli aĝa frato de Petrov, rakontas en sia aŭtobiografia romano *Mia krono diamanta* interesajn detalojn pri la fama verkista duopo kaj pri la cirkonstancoj en kiuj ili kreis la du romanojn. Evidentiĝas, ke la duopo uzis realajn modelojn por krei ĉiujn siajn romanheroojn. La modelo de Ostap Bender estis Osip Ŝor (1897-1979), iutempe ano de la Odesa krima polico, kiun la proksimuloj nomis Ostap. La verkista duopo eternigis en siaj romanoj lian kromnomon, multajn el liaj rakontoj kaj eĉ multajn el liaj eldiroj. La rilato inter la historia Ostap kaj la fikcia Ostap estas ege interesa kaj povus fariĝi temo de aparta artikolo. Mi mencias nur kelkajn frazojn, per kiuj Katajev priskribas la artecan aspekton de la ambigua (ne senmakula) personeco de Ostap Ŝor:

«Ostap estis allogata al poetoj, kvankam dum sia vivo li verkis eĉ ne linion. Sed en animo li estis la plej originala poeto el ni ĉiuj.»

Ostap Bender prezentas sin kiel "turka civitano", dum Ostap Ŝor estis judo kiu kutimis diri: "Mia patro estis turka civitano", por tiel eviti militservon. Ĉu kreante simetron inter la sorto de la "eterna judaĉo" kaj tiu de Ostap Bender, la aŭtoroj pensis, ke iusence ili eternigas la personecon de Ostap Ŝor?

Koran dankon kaj gratulon al Aleks Kerbel, kiu trovis la tempon kaj energion esperantigi la du geniajn romanojn de Ilf kaj Petrov, kaj ankaŭ kompilis esperantlingvan aranĝon de fragmentoj el *Mia krono diamanta* de Valentin Katajev. Tiun ĉi mi uzis en la supraj komentoj.

Mi ĝojus, se bona profesia eldonisto uzus tiujn tradukojn por realigi altkvalitan eldonon, tre serioze provlegitan, eventuale aldonante ankaŭ la 18-paĝan kompilaĵon el la romano de Katajev.

★



Tone

Kapoejraj¹ kantoj

Antonio Moreira Filho estas instruisto kaj Esperanto-muzikisto, fame konata en brazilaj kaj eŭropaj aranĝoj pro repoprezentadoj laŭ la kromnomo **Tone** kaj pro la moto Repe, ritme, sone... Tone – titolo de lia unua repalbumo. Lia rilato kun la kapoejra mondo estas delonga kaj, kvankam ĝi ne estas profesia, la respekto, kiun li nutras al tiu arto, estas nemezurebla. Laŭ li, pli ol praktiki kapoejron kun lerteco, oni devas kompreni ĝian realan valoron.

LK dankas al **Milene Rinaldi** pro la belegaj fotoj, kaj al **Roger Gotardi**, kiu peris la artikolon al LK.



Sonu, sonu, berimbaŭ'...

Sonu, sonu berimbaŭ'
Pri danĝero zorgu vi
Kapoejr' estas danĝero
Jes danĝera estas ĝi...

Kapoejr' estas danĝero
Kamarado zorgu vi
Pri la frapo, pri la bato
La atako zorgu pri.

En Afriko, en Eŭropo
Ameriko kaj Azio
Berimbaŭ' eke resonos
Ankaŭ en Oceanio.

Berimbaŭ' eke resonos
Akra estos ĝia krio
Ĝi kunvokos tutan mondon
Al konstanta harmonio.

Venu, venu, venu ĉiuj
Al kapoejra ludado
Al konstanta amikiĝo
Venu, venu, kamarado.

Kapoejr' estas agrabla
Sed ne donas nur amuzon
Krom la ludo ĝi liveras
Povan lerton, povan ruzon.

Je cent gradoj akvo bolas
Mia korpo nur je dek
Sufiĉas son' de berimbaŭ'
Por ke venu la varmeg'.

¹ Legu ankaŭ pri kapoejro en La Karavelo 3 (p.8-9), kaj aludon al ĝi en La Karavelo 24 (p.15, 5-a alineo). (JJS)

Se vi volas venu nun...

Se vi volas venu nun ^{kaj ne bezonas}

Tie ĉi esti fakul'

Por ludadi kune kun

Nur la volo estas postul'.

Venu kune, venu ludi, ^{ho mia kara,}

En nia tre fervora grupo

Venu senti kapoejron

Estas ĝi agrabla okupo.

Kapoejro estas danco, ^{estas arto}

estas lukto kaj batalo

Dum la tempo de l' sklaveco

Estis ankaŭ idealo

De la negroj, la sklavo

Estis helpo kontraŭ falo.

Longan tempon la sufero ^{Ho ve!}

Rondiradis nigran genton

Ilin mortigis amase

Ne nur korpon ankaŭ senton

Tiu popolo jes reagis

Kaj Kapoejron ili kreis

Sub la son' de berimbaŭ'

Malespero do pereis... Kamarad'

Vivu nia Di'

Jes, vivu nia Di', kamarad'

Vivu kapoejr'

Jes, vivu kapoejr', kamarad'

Vivu berimbaŭ'

Jes, vivu berimbaŭ', kamarad'

Vivu do Majstro Paŝĉinja²

Jes, Majstro Paŝĉinja, kamarad'

Ankaŭ vivu Majstro Bimba³

Jes, vivu Majstro Bimba, kamarad'

Vivu ĉiuj ni

Jes, vivu ĉiuj ni, kamarad'

2 Portugale: *Pastinha*. Vicente Joaquim Ferreira Pastinha (Salvadoro 1889-04-05 - Salvadoro 1981-11-13) estis unu el la ĉefaj kapoejromajstroj en la historio, kaj la plej granda disvastiganto de la tradicia kapoejro stilo nomata angola.

3 Manoel dos Reis Machado (Salvadoro 1900-11-23 - Gojania 1974-02-05) estis la kreinto de la bahia regiona lukto, kapoejro stilo poste nomata simple regiona. Bimba kaj Paŝĉinja estas la majstroj plej reprezentaj kaj omaĝataj en kapoejrorondoj.





Roberto Ribeiro

Brazilaj indiĝenaj rakontoj

La bela homo

Kelkfoje oni ne facile komprenas la sencon de indiana legendo, ĉefe kiam oni ne havas similan rakonton en nia kulturo. La legendo "La bela homo" de uanana etno, kiu vivas en Nordokcidento de Brazilo, ĉe rivero Negro, klarigas kial la gedioj ne vivas inter la homoj.

* * *



Uanano

Antaŭ longe, ĉe la bazo de la ĉielo, estis lando, kie ĉiuj estis belaj. Oni rakontas, ke tie, ĉe la uananoj, aperis junulino tiel bela, kiel la Luno. La junuloj freneze emis al ŝi. Ŝi estis simpatia al ili, sed ŝi ne amis iun el ili. Ŝi ridis, dancis, babilis kun ili, dolĉigis iliajn korojn, sed kiam ili proponis geedziĝon al ŝi, ŝi ne respondis. Junulo, filo de nobelulo, volis edziĝi al ŝi, sed ŝi respondis al li:

– Mi ne povas edziniĝi al vi, ĉar mi ne estas filino de nobelulo.

Kiam ne estis ceremoniaj dancoj, la junulino, je noktomezo, ofte eliris el sia hejmo. Neniu sciis, kien ŝi iris. La junuloj kuniĝis kaj diris:

– Ni vidos, kien tiu junulino ofte iras je noktomezo. Se ŝi iras amindumi kun iu viro, ni mortigos ŝian amanton.

Iufoje, kiam la lunlumo igis la nokton hela kiel tago, la junulino eliris sian hejmon kaj iris rekte al akvofalo. La junuloj sekvis ŝin. Kiam ŝi alvenis tien, ŝi sidiĝis sur ŝtono kaj turnis la vizaĝon al la ĉielo, rekte al la Luno. La junuloj tuj alvenis apud ŝin. Tie ili vidis certe la portreton de la Luno, kiu brilis sur ŝia vizaĝo, ekzakte tian, kia estas en la ĉielo la Luno. La junuloj haltis spiri. Iliaj koroj tremis en ili, iliaj okuloj dancis antaŭ la fajro de la Luno. Ne, ili ne povis paroli!

Kiam la Luno iris al la alia flanko de la mondo, ĉiuj junuloj vidis, ke malsupreniris el la ĉielo la junulino bela kiel la Luno mem. Tiu homo leviĝis, sed ili vidis, ke ŝi nun estas vira junulo!

La uananaj junulinoj freneze ekscitiĝis vidante tiun junulon, kiu brilis kiel la Luno.

Kaj ili ĉiuj ofte flirte babilis kun la junulo, bela kiel la Suno. Ĉiuj junulinoj de tiu lando amis tiun junulon, kiu estis kvazaŭ ŝamano.

Ĉiujn noktojn li iris al la haveneto por sidiĝi sur la sablo, kaj la junulinoj tien iris por renkonti lin. Tamen, lia koro restis malema al la junulinoj. Malĝoje li rigardis ilin kaj je noktomezo ili revenis hejmen. Li restis tie sola.



Regiono de la uananoj

La junulinoj ne sciis, kion fari por plaĉi al li. Iufoje unu el la junulinoj diris:

- Laŭvice ĉiu el ni iru sola al la haveneto. Tiel eble la junulo volos unu el ni. Ni iru nun laŭvice, por ke li seksumu kun unu el ni, eĉ se perforte! Kiu estos la unua?

- Mi! Se min li ne volos, mi ĵetiĝos en la riveron!

Ĉiuj tuj diradis:

- Jes ja! Unu el ni certe iros kun vi, por gvati de malproksime, kion vi faros.

Dumnokte, la junulo iris al la haveneto, kaj tuj poste iris unu el la knabinoj. Kiam li demandis pri ŝiaj kunulinoj, ŝi respondis ke ili restas hejme.

- Kial do vi venis ĉi tien?

- Mi venis ĉar vin mi amas.

- Kaj kial vi min amas?

- Mi vin amas ĉar vi estas mia koro.

- Se mi dirus kial vi ne povas min ami, ĉu vi silentus pri tio?

- Mi silentos.

- Do aŭskultu. Mi ne kreskis ĉe vi. Mi estas fremda. Tial vi ne scias, kia mi estas. Vi ĉiuj venas al mi. Vi ĉiuj volas edziniĝi al mi. Ĉar vi diris, ke vi ne malkaŝos mian sekreton, tial mi montros al vi, kia mi estas.

Li demetis sian tangaon kaj diris:

- Rigardu. Mi eĉ ne estas viro! Mi eĉ ne estas virino!

Kaj ŝi ne plu vidis ion ajn. Ŝi kuris al la rivero kaj sin ĵetis tien.

Kiam ŝiaj kunulinoj ŝin elprenis el la rivero, li kisis ŝian buŝon kaj parolis ĉe ŝia orelo:

- Vi vidis, ke mi ne estas viro, kaj ke mi ne estas virino! Kaŝu bone en la koro, kion vi vidis.

La junulinoj tuj alportis sian kunulinon hejmen. En la sekva tago ili demandis:

- Li ne vin volis... Ĉu?

Freneze kaj malĝoje, la knabino rigardis al la junulo. Kaj ĉiuj diris:

- Morgaŭ, se li ne volos unu el ni, ni lin mortigos.

La junulo aŭskultis, kion oni diras, kaj ekridis.

En la sekva tago, la junulo iris al la haveneto frumatene. Li blovis pluveton maldensan. Kiam la junulinoj vekiĝis, ili vidis fumon grandan. Kiam ili eniris en la fumon serĉante la junulon, ili ne trovis lin. Nokte, venis la vento granda, kiu forigis la fumon. Kaj unu el la junulinoj kriis:

- Ho... ho... ho... li malaperis! Ili ĉiuj malĝojiĝis. Tiam ili iris dormi.

* * *

Pro tio, ke la nuntempa homo ne demandas, kial la gedioj ne vivas inter ni, la rakonto ŝajnas stranga.

Modernulo emus trovi en ĝi elementojn de siaj propraj demandoj. Ekzemple, iu povas pensi, ke la rakonto rilatas al samseksemo, ĉar la fremdulo estas duseksa; aliaj povas pensi, ke la legendo pritraktas eksterterajn kosmonaŭtojn, ĉar la fremdulo iras al la Luno, revenas el la Ĉielo kaj malaperas per granda fumo. Tio okazas, ĉar demando pri eksterteruloj kaj pri samseksemuloj estas multe pli oftaj en nia kulturo, ol la demando pri la naturo de la gedioj.

La serpento Norato

En Sudameriko estas multaj indianoj, kiuj devenas de miksiĝo de malsamaj etnoj kaj apartenas al neniu el ili, sed konsistigas diversecan popolamason. Ĝenerale ili ne havas la samajn rajtojn de "etnaj" indianoj: ili ne povas loĝi en indianaj rezervejoj, ne rajtas monhelpon, kaj ne havas la atenton de internaciaj organoj kiuj zorgas pri "malgrandaj etnoj". Laŭleĝe ili estas kiel eŭropanidoj aŭ afrikanidoj, sed la plejparto el ili vivas tre mizere. En Brazilo, oni nomas tiujn "ĝeneralajn" indianojn kabokloj (PT: caboclo) [ka'boklo], etimologie "tiu kiu odoras kiel kapro". Nuntempe oni ne plu sentas ofenda la vorton "kaboklo", tamen la vorto "PT bugre" (sovaĝulo) ankoraŭ estas ofenda, kaj ĝi sinonimas kun "kaboklo".

Kaboklino baniĝis en la rivero Klaro (PT: Claro) ['klaro], kaj la akvoj de la rivero gravedigis ŝin. Ŝi naskis du gefilojn ĉe la bordo de rivereto Kaŝoejro (PT: Cachoeiri) [kaŝo'ejri], inter la riveroj Amazono kaj Trombeto (PT: Trombetas) [trom'betas]. Ŝiaj du ĝemelaj gefiloj estis du nigraj serpentoj. La kaboklino nomis ilin per kristanaj nomoj: Honorato, karese "Norato", kaj Maria.

La serpento Norato estis bona kaj forta. Li ne faris malbonon al iu ajn. Male, li savis multajn homojn, kiuj droniĝis en la riveroj. Li batalis kontraŭ multaj monstraĵoj fiŝoj. Dum la tago, li naĝis, sed vespere, kiam la Luno aperis sur la ĉielo, li iris al plaĝo. Tiam Norato transformiĝis: li lasis la serpentan haŭton kaj iĝis bela junulo. Li amis festojn. Li dancis, flirtis knabinojn, babilis kun aliaj junuloj. Nokte, li vestiĝis denove per serpenta haŭto kaj plonĝis en la riveron.



Amazonia serpento

La amazoniaj kabokloj havas interesajn mitojn pri modernaj aferoj, ekzemple, pri origino de flughavenoj. Ili vivas inter la indiana kaj la eŭropa kulturoj, tial ili devas trovi indianajn klarigojn por eŭropdevenaj aferoj. Unu el tiuj demandoj estas kial indianoj militservas ĉe brazila armeo.

Kvankam militservo estas laŭleĝe deviga por ĉiuj viroj en Brazilo, ĝenerale ĉiuj brazilaj soldatoj estas volontuloj, ĉar ne ekzistas sufiĉe da vakoj por ĉiuj dezirantaj plenumi la devigon militservi. Brazilaj junuloj rigardas la militservon kiel gravan oportunon por socia sukceso kaj sufiĉe interesa kariero. Miloj da etnaj indianoj kaj kabokloj estas volontuloj ĉe brazila armeo, precipe en Amazonio.

* * *

Lia fratino Maria estis malbona kaj senbrida. Neniam ŝi vizitis sian patrinon. Ŝi dronigis ŝipojn kaj forigis manĝeblajn fiŝojn. Pro tio, Norato mortigis ŝin dum terura batalo. Ambaŭ serpentoj luktis meze de la rivero Madejro (PT: Madeira) [ma'dejra]. Kie ili luktis, tie aperis granda kirlejo, kiu ekzistas ĝis la nuntempo.

Por ke li definitive transformiĝu en homon, estus necese, ke iu malsorĉu Noraton, kiam li dormas. Poste, oni devus ĵeti tri gutojn da virina lakto en la buŝon de la serpento kaj frapi per tutnova fera ilo ĝian kapon. La serpento malfermus la buŝon kaj tri gutoj da sango elirus el ĝia kapo. Tiam, Honorato restus homo por ĉiam. La problemo estas, ke neniu estis sufiĉe kuraĝa por fari tion kaj eĉ neniu havis novan, neuzitan, feran ilon.



Amazonia kaboklo



Kabokla domo ĉe rivero Puro (PT: Purus)

Foto de Jair Jacqmont el
<http://www.portalentretextos.com.br/colunas/recontando-estorias-do-dominio-publico/o-aproveitamento-artesanal-da-balata,236,4258.html>
 (2012-08-20)

Iufoje, dum vespera festo, Norato ekkonis soldaton. Ĉi tiu estis kuraĝa militisto, kiu havis tutnovan feran bajoneton. Tiam Norato petis al virino iom da mamlakto. Ŝi ĝin donacis al li. Kaj Norato informis la soldaton pri la loko, kie li dormos dum la tago.

En la sekvanta tago, la soldato atendis, ke la serpento ekdormu. Kiam li vidis la serpenton dormanta, li ĵetis la lakton en ĝian buŝon kaj frapis ĝian kapon per sia bajoneto. Tiel Norato iĝis normala homo. Norato tre dankis la soldaton, petante por kuniri kun li en armeon.

Tiel ankaŭ Norato iĝis bona soldato. Neniu

eksciis, ke li jam estis akva monstro.

* * *

Per tiu rakonto, oni vidas, ke militservo estas al kaboklo perilo por akiri "normalan" vivon. Eĉ se homo estas mita monstro, eĉ se iu ne konas sian patron, eĉ se ies patro estas "la rivero", oni povas iĝi soldato de brazila armeo. Kiel soldato, oni akiras rajtojn, kaj do oni iĝas "vera homo". Eĉ nuntempe, kabokloj ne trovas pli facilan vojon al plena posedo de "normala" socia vivo ol la militservon.

★

DOLÇA RIZO

João José Santos

fotis kaj verkis
laŭ recepto de sia patrino



**JEN UNU EL LA PLEJ OFTAJ PORTUGALAJ DESERTOJ.
ONI MANĜAS ĜIN HEJME, EN RESTORACIOJ KAJ EN KAFEJOJ.
VERŜAJNE ĜIN PORTIS AL PORTUGALIO LA ARABOJ.**

Ingrediencoj

450 gramoj da glua rizo
350 gramoj da sukero
6 ovoflavaĵoj
8 litrodekonoj da grasa lakto
2 supkuleroj da butero
1,5 litro da akvo
1 stangeto da cinamo
polva cinamo
1 citronŝelo (sen blankaĵo)
1 kafkulereto da salo

Preparado

1. Boligu lakton.
2. En alia ujo, boligu akvon kun citronŝelo, salo, butero kaj cinama stangeto.
3. Kiam la akvo bolos, metu rizon en ĝin kaj boligu.
4. Kiam la rizo estos kuirita, aldonu sukeron kaj miksadu por ne rosti.
5. Iom post iom aldonu la boligitan lakton en la rizon ĝis pasteca stato.
6. Aldonu iom da malvarma lakto al la ovoflavaĵoj por dissolvi ilin.
7. Demetu la rizon desur la fajro kaj aldonu la dissolvitajn ovoflavaĵojn, perfekte miksante ilin en la rizon.
8. Verŝu la dolĉan rizon en telerojn, teleretojn aŭ bovlojn.
9. Post malvarmiĝo, ornamu la rizosurfacon per cinama polvo.